


BRAZILA ESPERANTISTO

55-A JARO

NOVEMBRO - DECEMBRO 1961

N.º 572-573

XVII-a BRAZILA KONGRESO DE ESPERANTO PORTO ALEGRE - RIO GRANDE DO SUL - OKTOBRO 1961



Solena Malferma Kunsido en la aŭlo de la Universitato de Rio Grande do Sul (7 Oktobro). Sur la podio, la Estraro de la Kongreso, la Prezidanto de BEL la Prezidanto de la O.K., aŭtoritatuloj kaj reprezentantoj.

NOVEMBRO-DECEMBRO 1961

55-a Jaro

N.º 572-573

BRAZILA ESPERANTISTO

("O Esperantista Brasileiro")

Oficiala organo de

BRAZILA ESPERANTO-LIGO

Societo de publika utileco, laŭ registara
dekreto N. 4356, 26 Oktobro 1921

Direktoro :

A. CAETANO COUTINHO

Respondeca redaktoro (redactor principal) :

D-ro CARLOS DOMINGUES

Administracio kaj Redakcio :

Praça da República, 54, 2.º

Telefone : 42-4357

Sidejo de la Brazila Societo de Geografio

RIO DE JANEIRO — BRAZIL

Senpaga por anoj de B. E. L.

Eksterlande : unu dolaro aŭ 15
respondekuponoj

QUOTA ANUAL DE ADESAO À LIGA BRASILEIRA DE ESPERANTO 1962

(De acordo com os Estatutos todos os
membros são automaticamente filiados à
organização mundial)

Membro-Simples : recebe a carteira de sócio, os cupões de serviço e o "Brazila Esperantisto"	500,00
Membro com direito ao Anuário : re- cebe o mesmo que o antecedente e mais o Anuário do movimento esperantista	1.000,00
Membro Assinante : recebe o mesmo que o antecedente e mais a revista "Esperanto"	2.000,00
Membro Mantenedor : recebe o mes- mo que o Membro Assinante ...	3.000,00
Patrono : recebe o mesmo que o Membro Assinante	20.000,00
Membro Vitalício : recebe o mesmo que o Membro Assinante	40.000,00

Tôdas as importâncias devem ser remetidas
em cheque bancário ou vale postal à

LIGA BRASILEIRA DE ESPERANTO
PRAÇA DA REPÚBLICA, 54, 2.º
Rio de Janeiro, GB

PENSOJ

Estas bone esti laŭdata, sed estas pli
bone esti laŭdinda.

Seneko

Por patrino, la plej dolĉa rekompenco
por ŝia virto estas povi prezenti ŝian
personon kiel modelon al ŝia filino.

Mme. Genlis

Ordo estas riĉeco, ĉar kiu scias laŭre-
gule konduki sian vivon, tiu duobligas
siajn vivrimedojn.

Smiles

Niaj deziroj okupas pli da spaco ol
niaj bezonoj.

Wertheimer

La faltoj (haŭtosulketoj) estas la voje-
toj per kiuj la travivita sperto akirita
renkontas la iluziojn forirantajn.

Petit Senn

CURSOS DE ESPERANTO POR CORRESPONDÊNCIA

Elementar —	Cr\$ 1.000,00
Diploma —	" 500,00
Superior —	" 2.000,00
Diploma —	" 1.000,00
Magistral —	" 4.000,00
Diploma —	" 2.000,00

Os diplomas, conferidos pela Liga Bra-
sileira de Esperanto segundo as normas da
Academia de Esperanto, têm validade
internacional.

NOVIDADE

E. Tudela Flores

VOCABULÁRIO ESPAÑOL-ESPERANTO

Preço Cr\$ 665.00

VOCABULÁRIO ESPERANTO-ESPAÑOL

Preço Cr\$ 665.00

BRAZILA ESPERANTISTO

55-A JARO

NOVEMBRO-DECEMBRO 1961

N.º 572-573

XVII-a BRAZILA KONGRESO DE ESPERANTO

BRILA SUKCESO DE LA ESPERANTISTA MANIFESTACIO EN PÔRTO ALEGRE

Kun granda brilo kaj neniel mal-supera al la antaŭaj landaj kongresoj, dank'al la sindona laboro de la Organiza Komitato gvidata de la senlaca batalanto Generalo Wanderley F. Gonçalves, okazis de la 7-a ĝis la 14-a de Oktobro la XVII-a Brazila Kongreso de Esperanto. Venkante ĉiujn malfacilaĵojn kaj malhelpojn, speciale tiujn prezentitajn lasthore de la landa situacio, la O.K. povis oferi al la esperantistoj Kongreson plenan de altiraj programeroj. Efektive la programo estis lerte kaj inteligente preparita. Eĉ por la vetero oni atente zorgis, ĉar la elektita sezono estas en la suda ŝtato Rio G. do Sul la plej agrabla por akcepti personojn el aliaj latitudoj.

Spite de la iom maltrankviligaj cirkonstancoj ĝuste en la lastaj tagoj antaŭ la Kongreso, ĉi tiu sukcesis havi la ĉeston de esperantistoj el la malproksimaj ŝtatoj Ceará kaj Pernambuco, multaj el Minas Gerais, pluraj el Rio de Janeiro, São Paulo kaj Paraná. Kompreneble la ĉesto de samideanoj el Rio Grande do Sul estis rimarkinda. Kaj fine la partopreno de amikoj el Argentino kaj Urugvajo donis al nia XVII-a aspekton de iom internacia kunveno.

PREPARA KUNSIDO

La 7-an de Oktobro instaligis en Porto Alegre, kulturita kaj progresema ĉefurbo de la ŝtato prepara kunsido de la Kongreso en la aŭlo de la Universitato de Rio Grande do Sul, afable disponigita kun pluraj aliaj ĉambroj por Kongresejo de lia Rektora Moŝto, Prof.-ro Eliseu Paglioli.

Malformis la kunsidon la prezidanto de la Organiza Komitato, Generalo Wanderley F. Gonçalves, kiu invitis sidi sur la podio D-ron Carlos Domingues, prezidanto de Brazila Esperanto Ligo, D-ron Ernani Correa, prezidanto de la Esperantista Societo de Porto Alegre, kaj la reprezentantojn de la diversaj kluboj kaj societoj esperantistaj. Post kelkaj salutvortoj, la prezidanto de la O.K. konsultis la plenan pri la procedo adoptota por la elekto de la kongresa estraro. Post unuanima decido favore al aklamado, estis elektita kun aplaŭdado la estraro, laŭ propono de D-ro Joaquim do Couto, (Niteroi) : Prezidanto, Prof. D-ro Ernani Correa (Porto Alegre) ; 1-a Vicprezidanto, Prof. Fernandes Menendez (Urugvajo) ; 2-a Vicprezidanto, S-ro L. Milkuschutz (Argentino) ; 3-a Vicprezidanto, D-ro Mario Ritter Nunes (Niteroi) ; 4-a Vicprezidanto, Inĝ. Alberto Flores (Volta Redonda) ; Ĝenerala

Sekretario, Ing. G. Arthur Brown (Porto Alegre); 1-a Sekretario, Francisco Ferreira Ristal (Recife); 2-a Sekretariino, S-ino Zaida Sacks (Porto Alegre).

Prof. D-ro Ernani Correa enoficiĝis kaj, kore dankinte la kongresanojn, invitis la aliajn ĵus elektitajn estraranojn sidi sur la podio kaj anoncis la nomojn de la samideanoj, kiuj konsistigos la diversajn kongresajn komisionojn, nome: Komisiono pri tezoj — Gen. Ivário Moraes (Niteroi), S-ro Gert Drucker (Curitiba), D-ro Romulo Zeballos Morales (Urugvajo). Komisiono pri proponoj — D-ro João Correa Severo, (Bajé), Kol. José Correa de Barros (Porto Alegre). Komisiono pri redaktado — D-ro Belmonte Modesto de Abreu (Porto Alegre), Heinz Weiss kaj Manoel Silveira.

Post informo de la prezidanto de la O.K., pri la disvolviĝo de la kongresa programo, D-ro Ernani Correa parolis pri la tagordo kaj klarigis kelkajn detalojn. Ĉar neniuj alia kongresano deziris paroli, la prezidanto fermis la kunsidon.

EKSPOZICIO

Unu el la plej elstaraj programeroj estis la Esperanto-ekspozicio, sindone kaj inteligente organizita de S-ino Débora Eston kun la helpo de fervoraj gesamideanoj. La ekspozicio, kiu estis antaŭvidita por la konstruaĵo Mata-Borrão, lasthore devis okazi en alia loko, — Konstruaĵo Regente — kio tre pligrandigis la laboron de la organizintoj. La riĉa materialo kaj la bonega aranĝo donis belan ideon pri la progreso de nia afero. Tie aperis eldonaĵoj de BEL.

Ĉe la inaŭguro, la 8-an, je la 16,30, parolis D-ro Joaquim do Couto, el Niteroi, Generalo Wanderley Gonçalves kaj D-ro Carlos Domingues, kiuj juste reliefigis la admirindan kontribuon

de S-ino Débora Eston al la sukceso de la Kongreso.

MALFERMA SOLENA KUNSIDO

En la sama impona aŭlo de la Universitato malfermiĝis la kunsido per la ludado de la Nacia Himno kaj de la Espero fare de la militista muzikistaro. La prezidanto tiam invitis al la podio la ĉeestantajn aŭtoritatulojn kaj reprezentantojn.



Parto de la Ekspozicio de esperantaĵoj

La ĝenerala sekretario kaj la unua sekretario legis la plej esprimoplenajn salutleterojn de personoj kaj institucioj nome; de la Ŝtatestro de Pernambuco, Ŝtatestro de Minas Gerais, Ĝenerala Direktoro de la Brazilo Poŝto, Sekretario pri Edukado kaj Kulturo de Ŝtato Pernambuco, Sekretario de Ekonomio de Ŝtato Rio Grande do Sul, Urbestro de Recife, Prezidanto de la Komunuma Konsilantaro de S. José dos Campos, Estro de Komunuma Departamento de Dokumentado kaj Kulturo de Recife, Ligo de la Brazilaj Radiamatoroj (Sekcio de Pernambuco), Pernambuka Esperanto-Asocio, Esperanto-Asocio de urbo Rosário (Argentino) Volta Redonda. Esperanto-Klubo, Esperantista Societo de Cachoeira do Sul, Bancional Club (São Paulo).

Laŭ tradicio de la kongresoj audiĝis la oficiala saluto de Brazila Esperanto-Ligo. La Prezidanto Prof. D-ro Carlos Domingues rememorigis la pionirojn de nia Movado en Rio Grande do Sul, reliefigis la modelan laboron de la O.K., aparte bonvenigis la alilandajn samideanojn. Ĉar D-ro Ernani Correa estis invitita fari la oficialan paroladoron antaŭ sia elekto kiel prezidanto de la Kongreso, li transdonis la prezidantecon de la kunsido al D-ro Carlos Domingues, prezidanto de BEL kaj legis belan prelegon pri Esperanto kaj la Esperanto-Movado.

Post Prof. Fernandes Menendez salutis la kongresanojn, nome de la urugvajaj esperantistoj, kaj juna lernanto el la Normala Lernejo n.º 4 de la urbo Rafaela (Argentino), diris kelkajn salutvortojn en la nomo de sia lernejo. Petis la parolon D-ro Alfeu Barcelos, prezidanto de la Komunuma Konsilantaro de Porto Alegre, kiu elokvente salutis la kongresanojn kaj prezentis bondezirojn pri la sukceso de la kongreso.

La ĉeestantaro vigle aplaudis la parolintojn kaj post la lasta parola-

do D-ro Hernani Correa fermis la kunsidon kun danko kaj invito al la sekvontaj.

LABORKUNSIDOJ

Kun ĉeesto de la plej granda parto de la kongresanoj okazis 6 laborkunsidoj en la tagoj 8, 10 kaj 12, du por tagoj, antaŭ-tagmeze kaj post-tagmeze.

En la komenco de la dua laborkunsido estis necese reformi la komisionon pri proponoj, pro foresto de du el ĝiaj membroj. La pleno elektis S-anojn José Ferreira Ruas (Soledado) kaj Dirceu Porciúncula (Rio Grande) por ĝin konsistigi kun D-ro João Correa Severo.

Dum la diversaj laborkunsidoj, estis aprobitaj jenaj proponoj kaj sugestioj: pri rememoro de jenaj pioniroj, loĝintaj en Rio Grande do Sul al kiuj la Esperanto-Movado devas grandajn servojn, nome: Arno Ernst, Cristiano Kraemer, Francisco Valdomiro Lorenz. Omaĝe al tiuj mortintoj, la pleno stariĝis kaj restis silenta dum unu minuto.

Ke la Kongreso, apogante la alvokon faritan de BEL al la Brazila Re-



Parto de la ĉeestantaro en la Solena Malferma Kunsido.

gistaro pere de la Ministerio de Edukado kaj Kulturo, sin turnu al la Ĉefministro kun peto, ke li prenu la iniciaton pri internacia konvencio starigonta la laŭgrandan enkondukon de Esperanto en Universitatoj kaj aliaj lernejoj;

ke la Kongreso konsideru kiel honorajn kongresanojn la gvidantojn de la urugvaja kaj argentina karavanoj, nome, Prof. Fernandes Menendez kaj S-ro J. Milkuschtz;

ke laŭ ekzemplo de Brazila Klubo Esperanto, el Rio de Janeiro, la grupoj disaŭdigantaj Esperanto-programojn sin anoncu en la esperantista gazetaro, kaj ke la ceteraj grupoj starigu programon, uzante la jam disponeblan materialon por informado kaj instruado;

ke BEL sin turnu al ĉiuj ŝtataj registaroj kun peto, ke ili starigu ĉe la koncernaj sekretarioj pri Edukado, Departementon de Esperanto, por disvastigo kaj orientado de la Esperanto-instruado ĉe la ŝtataj instruistoj kaj ankaŭ, ke ili starigu specialan krompagon je 5% de la normala salajro al ĉiuj instruistoj, kiuj posedante la elementan Esperanto-Diplomon instruu la internacian lingvon en siaj lernejoj;

ke la pleno manifestu sian dankon al ĉiuj personoj, societoj kaj kluboj, kiuj iel ajn kontribuis al la brilo de la XVII-a;

ke la Kongreso sin turnu al la Urbestro de Brasilia kun peto, ke li donu la nomon Zamenhof aŭ Esperanto al strato aŭ placo en la ĉefurbo de Brazilo;

pri aplaŭdoj al la Ĝenerala Direktoro de la Brazila Poŝto S-ro Roberto Tarlé Filho, pro la salutletero de li sendita al la XVII-a Kongreso kaj al la Regiona Direktoro de la Poŝto en Porto Alegre, pro la filatela giĉeto, kiun li disponigis al la kongresanaro;

ke BEL funkciigu ĉe ĉiu jarfino senpagan ferian kurson por formado kaj perfektigado de la Esperanto-instruistoj. La esperantistaj grupoj klopodu por havigi stipendion por pagi la vojaĝon kaj gastigon de la kandidatoj. La partoprenantoj de tiu kurso estu elektataj per konkurso;

ke ĉiu esperantistaj grupoj klopodu por havigi la apogon al la Esperanto-Movado, fare de ĉiuj neesperantistaj kongresoj, okazontaj en nia lando;

ke ĉiuj esperantistaj grupoj klopodu por havigi senpagan afrankon, poŝtan kaj telegrafan, por ĉiuj korespondadoj rilataj al la Esperanto-Movado;

ke oni esploru la eblecon okazigi Tutamerikan Esperanto-kongreson.

Tri interesaj tezoj estis prezentitaj al la Kongreso: a) de S-ino Zuleide



En la solena Malferma Kunsido salutparolas juna lernanto el la Normala Lernejo n.º 4 de la urbo Rafaela (Argentino).

Laranjeira, (São Paulo) pri la Instruado de Esperanto"; b) de S-ro S. Augusto, el Manaus, pri la "Interna Ideo de Esperanto"; c) de S-ro Moacir Cunha, (Recife), pri "Esperantistaj Grupoj kaj Societoj". Estis legitaj sed ne povis esti submetitaj al decido de la Kongreso ĉar ili ne plenumis la postulojn de la kongresa regularo, rilatajn al tiu afero. Tamen,

la Kongreso laŭ propono de la raportintoj, aprobis laŭdon kaj dankon al le verkintoj de la tezoj pro iliaj valoraj kontribuajoj.

ARTFESTOJ

Du belaj kaj interesaj eroj de la kongresa programo estis la artaj vesperoj, prezentitaj sur la scenejo de la aŭlo de la Belarta Instituto. Ĉe la unua vespero, lundon, la 9-an sin prezentis la Centro de Gaŭcaj Tradicioj 35, kiu ravis la ĉeestantaron per gaŭcaj folkloraj dancoj kaj kantaĵoj. La prezentado oni komencis per kantado, en Esperanto, de folklorajo "Prenda Minha" tradukita esperanten de S-ano Ivo Sanguinetti, kun la titolo "Karulino". La dua arta vespero, vendredon, la 13-an, komenciĝis per deklamado fare de S-ro João Ezio Nogueira. Sekvis bela kantprezentado de la kantistino Regina de Boer. Fine sin prezentis la kanthoro de la Filozofia Fakultato de la Universitato de Rio Grande do Sul. La prezentado de tiu kanthoro, kiu komenciĝis per kantado de "La Espero", lasis al la ĉeestantaro neforgeseblan impreson kaj neforigeblan memoron de arto kaj beleco.

PRELEGO PRI ESPERANTO

La 11-an, je la 21-a, en la aŭlo de Belarta Instituto, Generalo Wanderley Gonçalves faris erudician prelegon pri la problemoj de la Internacia Lingvo. Majstre li skizis la devenon kaj historion de Esperanto. La prelego estis speciale destinita al informo al neesperantista publiko, sed kompreneble ĉeestis multaj kongresanoj, kaj la granda aŭlo estis plena. La preleginto ricevis varman aplaŭdon.

Kiam poste la parolo estis donita al la ĉeestantoj por demandoj, plu-



La gedancantoj en la festo ĉe Belarta Instituto.

raj personoj aŭdiĝis kun interesaj komentarioj. Aparte menciita, Inĝ. Alberto Flores resume raportis pri siaj agrablaj spertoj dum sia freŝdata restado en Germanujo.

EKSKURSOJ

Tri agrablaj ekskursoj okazis inter la kongresaj laboroj. Sur la rivero Guaíba, la kongresanoj veturis per la vaporŝipo disponigita de SETUR (Ŝtata Turisma Servo). Tio estis bona okazo ne nur, por ke la ekskursantoj ĝuu mirindajn vidaĵojn, inter ili la leviĝan ponton, sed ankaŭ por interkonatiĝo, babilado kaj amikiĝo. En la tuttaga ekskurso, jaŭdon, al la grava urbo Caxias, fama per siaj bonegaj vinoj, oni vizitis la grandegan Sociedade Vinicola Rio Grandense do Sul, Granja União, kie oni regalis la kongresanojn per glaso da plej bona vino. Plie oni konstatis la multflankan industriaran progreson de la urbo. Tre plaĉis al ĉiuj la tipe gauĉa tagmanĝo.

La ekskurso al la vidindaĵoj de la urbo Porto Alegre, sabate matene, konfirmis la juĝon pri la beleco de la urbo kun civilizita aspekto kaj evidenta konstanta disvolviĝo. Carme impresis sur la stratoj la arboj kovritaj de belaj violkoloraj floroj: Ĝi estis printempo. Tiu lasta ekskurso

finiĝis per ĉurasko, la bonkonata regiona manĝaĵo, en belega loko situanta ĉe la bordo de la rivero Guaíba.



Sur la ŝipo en la rivera ekskurso.

VIZITO AL AŬTORITATULOJ KAJ GAZETARO

La 10-an de Oktobro, poŝtagmeze, grupo da esperantistoj transportataj per omnibuso de kongresanoj el Minas Gerais vizitis la Ŝtatestron, Prezidanton de la Ŝtata Deputitaro, la Prezidanton de la Tribunalo de Justeco, la Prezidanton de la Komunuma Konsilantaro, kaj la Komunuman Sekretarion pri Edukado kaj Kulturo. Salutis la aŭtoritatulojn S-anoj D-ro Carlos Domingues, D-ro Ernani Correa, Prof. Joaquim do Couto kaj D-ro Carlos Resende. Ĉiuj vizitantoj montris varman simpatian al Esperanto; la Ŝtatestro, Ing. Leonel Brizola evidentiĝis perfekta konanto de la problemo de la Lingvo Internacia rakontante sian sperton pri la afero; afable kaj demokratie li konversaciis kun la kongresanoj lasante profundan impreson precipe al la alilandaj samideanoj. Vespere komisionoj de kongresanoj vizitis la lokajn gazetojn kaj radistacion, kie ili estis akceptitaj kun intereso kaj afableco.

FERMA SOLENA KUNSIDO

La 14-an de Oktobro, je la 9-a vespere, okazis la solena ferma kunvido de la Kongreso. La aŭlo bone lumigita estis plena de esperantistoj kaj neesperantistoj. La estrar-tablo bone ornamita per floroj, la verda standardo kun sia blanka stelo en la fundo de la salono, la portreto de D-ro. Zamenhof ĉe la flanko de la podio, la brazila, urugvaja kaj argentina flagoj kaj la entuziasmo de la ĉeestantaro donis al la festo imponan aspekton.

La soleno malfermiĝis per la ludado de la Nacia Himno. La prezidanto sidanta sur la podio kun eminentaj personoj donis la parolon al S-ro Boris Eston por ke li legu la ĉefajn rezoluciojn kaj deziresprimojn aprobitajn dum la Kongreso.

Poste, laŭ la tradicio, la Kongreso aŭdis la vortojn de la Prezidanto de BEL omaĝe al niaj mortintoj depost nia lasta en Salvador.

“Nia XVII-a Brazil Kongreso de Esperanto brile atingas sian finon post fruktodona atingo de sia celo.

Ĝia efiko longe sentiĝos en nia landa Esperanto-Movado ne nur pro la decidoj, kiujn ĝi faris, sed ankaŭ per la stimulo, kiun ĝi naskis.

En ĉi tiu solena momento ni omaĝu niajn mortintojn, tiujn, kiuj lasis nin depost la lasta Kongreso kaj ne povis ĉeesti nun kun ni.

Laŭ nia tradicio ni aŭdu iliajn nomojn kaj rememoru ilian sindonan laboron, per kies kunhelpo nia tasko fariĝis pli simpla: Alfred Agache, D-ro Giorgio Canuto, Pedro de Aquino Xavier, Kel. Cândido Bravo, Giovanni P. Faraco, Maria Luiza Bocayuva, Jaguaribe de Mattos, Raphael Forni kaj Elisabeth Diniz.

Mi petas, ke honore al tiuj karaj mortintoj la Kongreso stariĝu kaj restu silenta dum unu minuto.”

Sekvis parolado de la oficiala oratoro de la Kongreso, D-ro Carlos de Brito Velho, Komunuma Sekretario de Edukado kaj Kulturo. Kvankam li mem ne estas esperantisto, D-ro Brito Velho faris belegan kaj entuziasman paroladon pri la problemo de internacia lingvo kaj ĝia solvo per Esperanto. La ĉeestantaro varme aplaŭdis la erudician, elokventan humorplenan paroladon de la eminenta profesoro. Parolis ankaŭ D-ro Honor Torres da Silva, reprezentanto de la Ŝtatestro de Ceará kaj S-ro Ailton L. Rocha, reprezentanto de la ĝenerala Direktoro de la Brazila Poŝto. S-ro Paulo de Amorim Cardoso en la nomo de la esperantistoj el Fortaleza proponis, ke la XVIII-a Kongreso okazu en Fortaleza, Ceará kaj la kongresanoj per aplaŭdado salutis liajn vortojn, montrante, ke ili akceptis la inviton.

Post ludado de "la Espero" la prezidanto fermis la kunsidon kun danzo al la kongresanoj kaj ĉi tiuj



S-ro Paulo Amorim Cardoso, el Stato Ceará ĉe la fino de la Ferma Solena Kunsido invitas al la XVIII-a Brazila Kongreso de Esperanto en Fortaleza.

korpreme adiaŭis unu la aliajn ĝis la venonta renkontiĝo en Fortaleza. Ĉe la eniro la firmo Anakol Ltda. regalis la kongresanojn per skatoletoj kun siaj produktaĵoj — Denta kremo kun klorofilo KOLYNOS kaj sendolorigilo FONTOL.

EKSTERPROGRAMAJ AKTIVECOJ

Eksterprograme okazis du eroj. En la mateno de la 8-a de Oktobro, je la 8-a okazis meso por katolikaj kongresanoj en la kapelo de la Gimnazio Rosário. Predikis pastro Orêncio Vogels, kiu ankaŭ direktis kantadon de religiaj himnoj en Esperanto.

Je la 10-a efektiviĝis speciala kunsido por spiritistaj kongresanoj en la sidejo de Espiritista Federação de Rio Grande do Sul, proponita de la Estraro de tiu societo. Tiukaze parolis S-ro José Simões de Matos, prezidanto de la Federacio, Kol. Hélio de Castro, kiel oficiala oratoro, D-ro Carlos Domingues, Ing. Alberto Flores, Gen. Wanderley F. Gonçalves kaj Kol. Paulo Freitas. Ambaŭ solenojn ĉeestis multaj kongresanoj sendepende de sia religio.



Prof. D-ro Brito Velho, faras la Oficialan Paroladon

TELEVIDADO KAJ RADIO

En la antaŭtago de la Kongreso la tre aŭdata Stacio Televidado Piratini intervjuis je la 22-a pri la Internacia Lingvo D-ron Carlos Domingues, Generalon Wanderley Gonçalves kaj, Profesoron Boris Eston. Kelkaj kongresanoj vizitis tiam la Stacion. Ankaŭ la ŝatata Raĝio Universitária, de la Universitato de Rio Grande do Sul, havis intervjuon kun profesoroj Hernani Correa kaj Carlos Domingues, kiuj dum duonhoru detale parolis pri la Movado.

PERMESO AL PUBLIKOFICISTOJ

Laŭ permeso donita de la Prezidanto de la Respubliko kaj de la Ĉefministro pro peto de la O.K. la federaciaj oficistoj rajtis ĉeesti la Kongreson sen perdo de salajro.

Ankaŭ la ŝtatestro de Rio de Janeiro, D-ro Celso Peçanha, permesis, ke la ŝtataj oficistoj ĉeestu la XVII-an ne perdante siajn rajtojn pri salajro kaj aliaj.

KARAVANO EL MINAS GERAIS

La kongresanoj el Caratinga kaj Belo Horizonte veturis pli ol 3 000 kilometrojn per speciala omnibuso, ornamita per tolstrioj kun indiko de la Kongreso. En dekoj da urboj trairitaj de la omnibusoj kaj en Porto Alegre mem ĝi vokis la ĝeneralan atenton.

CLARISSA EN ESPERANTO

Por memorigi la Kongreson oni publikigos la Esperantan tradukon de la bela kaj ŝatata romano de Érico Veríssimo - *Clarissa*. Por tio la famkonata brazila verkisto afable donis specialan permeson. La tradukon fa-

BRAZILA REGISTRARO

S-ro Jânio da Silva Quadros neatendite forlasis en la 25-a de Aŭgusto lasta la prezidantecon de la Respubliko, kiun li plenumis dum preskaŭ 7 monatoj.

Sekvis politika krizo, kiu daŭris kelkajn tagojn, kaj fine la Brazila Parlamento reformis la Konstitucion per Aldona Akto, kiu starigis la parlamentan reĝimon.

S-ro João Belchior Marques Goulart, tiama Vic-prezidanto fariĝis Prezidanto kaj nomis Ĉefministro S-ron Tancredo de Almeida Neves.

ris nia klera samideano Leopoldo H. Knoedt, el Salvador, kiu jam akiris elstaran lokon en la Esperanta literaturo per sia majstra traduko de *Elektitaj Poemoj*, de Castro Alves.

STATISTIKO

Aliĝis al la XVII -a 396 samideanoj el preskaŭ ĉiuj brazilaj ŝtatoj, el Argentino kaj el Urugvajo, kiu klasigas en jenaj kategorioj: 221 kontribuantoj, 81 helpantoj kaj 94 akompanantoj.

VESPERMANĜO

Post la fermo de la Kongreso, en la 16-a, la Prezidanto de BEL invitis al tagmanĝo la membrojn de la O K kaj la prezidanton de la Kongreso kun familioj. Por la Ligo akceptis la invititojn F-ino Irani Baggi de Araujo, kasistino, kaj D-ro Carlos Domingues.

SENDU FRUE VIAN KOTIZON!

VARBU NOVAJN MEMBROJN!

ESTU DELEGITO DE LA MOVADO!

LIGA BRASILEIRA DE ESPERANTO

Em 29 de abril, último, às 16 horas, sob a presidência do Dr. Carlos Domingues, reuniu-se em sessão ordinária a Assembléia Geral da Liga Brasileira de Esperanto, convocada na conformidade dos Estatutos. Fizeram parte da mesa os senhores Francisco Ferreira da Costa Filho, 1.^o Secretário, Luiz Alberto B. Martins, 2.^o Secretário e D. Irani Baggi de Araujo, Tesoureira.

Feita a leitura da ata da sessão anterior, pelo 1.^o Secretário, foi aprovada sem discussão. Passando-se à ordem do dia, foram lidos o Relatório e o Balanço referentes ao ano de 1960, aquele pelo 2.^o Secretário e este pelo Tesoureiro. Ambos foram aprovados unanimemente, já havendo o balanço sido publicado no *Brazila Esperantisto*, como de ordinário.

A Assembléia aprovou votos de pesar pela morte de Dr. Giorgio Canuto, Giovanni P. Faraco, Maria Luiza Bocayuva Jaguaribe de Mattos, Raphael Forni e Elisabeth Diniz.

INFANAJ PENTRAĴOJ

Interŝanĝo kun Japanujo

S-ro Ŝoohaĉro Joŝihara, Estro de Sapporo Esperanto-Societo, sin turnis al BEL kun peto pri interŝanĝo de infanaj pentraĵoj kaj samtempe jam sendis belan materialon. Komisiite al BEL, F-ino Lila Teixeira Fak-Delegitino pri Turismo, sukcesis kun la helpo de nia samideano Prof. Gualberto Franco Pires Direktoro de la lernejo de Teksa Instruado plenumi la deziron de nia japana samideano per la sendo de interesaj pentraĵoj faritaj de la lernantoj de la Unuagrada Lernejo de Nacia Servo de Industria Lernado en Bangŭ.

Sekve BEL ricevis de S-ro Ŝoohaĉro Joŝihara jenan leteron, datumitan de 3/8.: "Nia societo certe ricevis la grandskalajn pentratojn de vi kun granda ĝojo antaŭ ĉirkaŭ unu monato." Ni esprimas koregajn dankojn kaj salutojn al vi pro via bonkora helpo, de tiel malproksima insulego Hokkajdo en Japanujo.

Ĝis nun nia societo ankoraŭ ne okazis la ekspozicion de pentraĵo de geknaboj en la mondo, pro ke nur malmultaj Esp.-grupoj de eksterlando estas respondintaj al nia peto. Tamen estas certe, ke en la baldaŭa estonto nia societo havos la ekspozicion, dezirante, ke la logantoj de tiu ĉi insulego sciu kaj komprenu ĝuste alilandanojn iom post iom pli multe. Post la sukceso de la okazigo ni povos informi pri ĝi al vi.

Transdonu niajn bondezirojn al s-ro Gualberto Franco Pires, direktoro de Escola de Aprendizagem Textil."

SEMO DE MARACUJÁ

Kontentigante peton de S-ro H. Ogata, el Yamaguĉi Medicina Kolegio, de Ube, Yamaguĉi, Japanujo, F-inoj Irani Baggi de Araujo kaj Lila Teixeira sendis al li semojn de la brazila *maracujá* kun jena klariga letero:

"Laŭ via peto ni havas la plezuron sendi al vi hodiaŭ semojn de MARACUJÁ (legu Marakuja).

Maracujá, nomo el la indiĝena brazila lingvo, tupia, estas frukto de vegetaĵoj el la tropika Ameriko (Brazilo, Peruo, Antiloj k.a.) kaj ankaŭ parto de Azio (France-grenadille), kaj volas diri "frukto, kiun oni suĉas".

El ĉirkaŭ 120 plantoj, multaj estas specoj manĝeblaj kaj kelkaj havas medikamentajn proprecojn.

Botanika latina nomo: *passiflora*, pasiflora (pasionfloro) el la latina *passio*, *passuas*, *pati* (suferi) kaj *flos*, *floris*, (floro).

La nomo pasionfloro estas donita de la unuaj misiistoj, kiuj trovis la planton en Sudameriko, pri tio, ke ĝiaj organoj (stamenoj, stigmoj k.a.) reprezentas la ilojn por la krucumo de Kristo (3 najloj, dornokrono k.c.).

Ni sendas al vi du specojn de semoj de Maracujá: la semoj, kiuj estas en koverto de Brazila Ligo produktas fruktojn pli acidajn kaj estas bonaj por prepari trinkaĵojn. Tiuj, kiuj estas en la granda koverto estas bonaj por esti manĝataj. Atentu, tamen, ke nur la internajo, la semoj estas uzitaj.

Semu ilin kaj ĉar la japanaj kulturistoj estas tre lertaj ni pensas, ke baldaŭ vi povos refreŝigi per tiu saniga kaj bona trinkaĵo.

Informu nin pri la rezulto."

46.º Congresso Universal de Esperanto

Por Francisco de Souza Almada, Delegado do Brasil.

Como nos antecedentes, o 46.º Congresso Universal de Esperanto foi acontecimento de grande repercussão mundial.

Realizou-se em Harrogate, na Inglaterra, de 5 a 12 de agosto de 1961, tendo como protetor Lord Boyd-Orr, M.A., M.Sc., F.R.S., Prêmio Nobel da Paz.

Com aproximadamente 1700 inscrições de esperantistas de cerca de 40 países, levou a cabo vastíssimo programa de trabalho, distribuído e elevado número de comissões que em reuniões e sessões levadas a efeito diariamente demonstraram o alto grau de interesse despertado pelo certame cultural.

A cidade escolhida, Harrogate, é incontestavelmente um verdadeiro jardim, além de possuir fontes de águas sulfurosas, semelhantes às do Araxá ou Poços de Caldas, no Brasil.

Trata-se de um recanto maravilhoso, próprio para descanso das pessoas que após longos meses de labuta em árduo trabalho, carecem de repouso para restaurar energias ou a saúde abalada.

Suas flôres e jardins encantam os visitantes, oferecendo espetáculo pouco comum, dada a beleza com que são cuidados. Enfim, a escolha não poderia ser melhor.

Relativamente a hotéis, a cidade não fica em nada aquém das estações de águas existentes em outras localidades do mundo.

O Congresso teve, pois, ótima sede, e, dados os preparativos com que foram cuidados todos os arranjos pertinentes a uma boa acolhida aos vi-

sitantes, tudo correu às mil maravilhas, tendo sido de imponente invulgar a sua inauguração oficial, realizada no Teatro Municipal, ricamente ornamentado.

Abriu os trabalhos o Prof. Hideo Yagi, vice-presidente da U.E.A. e presidente do Congresso, que começou por homenagear as memórias dos incansáveis batalhadores pela causa do Esperanto, já falecidos, Srs. General Bastien e Prof. Canuto, este ex-presidente da U.E.A.

A seguir, declamou o Sr. W. Auld um poema de M. Boulton em honra do Prof. Canuto, vindo depois o desfile de 38 crianças pelo palco, ante os componentes da Mesa dos Trabalhos.

Tomaram parte na aludida Mesa as seguintes pessoas, além das já referidas: R. W. Hamilton, presidente do L.K.K., que saudou os congressistas, declarando que os esperantistas britânicos se orgulhavam pelo fato de ser escolhida Harrogate como sede do Congresso, por ser ela a rainha das cidades inglesas escolhidas para congressos; o prefeito de Harrogate, Sr. Conselheiro Frank Allum que, por sua vez, deu as boas vindas aos congressistas usando a língua nacional, porém, finalizando sua oração em Esperanto; o Sr. Hideo Yagi — já referido — declarou ser grande honra para ele presidir o Congresso. Agradeceu a quantos colaboraram para o seu sucesso, salientando quão grande significado tinha para o 46.º Congresso Universal o Primeiro Festival Artístico, ora realizado por ele no seu programa de trabalhos.

O Sr. H. W. Holmes, vice-presidente e esforçado presidente da U.E.A., procedeu à leitura da carta da UNESCO, que infelizmente não pôde enviar seu observador, anotando, entretanto, a ordem do dia, e enviando saudações e votos de felicidade.

A senhorinha M. Vermaas, diretora do C.O., leu alguns dos mais importantes telegramas, a saber: de Ludoviko Zamenhof, de Paris, cartas de Edmond Privat, da Sociedade Esperantista Helena, do Comité Esperantista Tchecoslovaco, da Coidealista Haudebine, de Nova Delhi, da IKUE-Juventude Esp. Soviética, etc., etc.

Tomaram assento à Mesa, ainda, as seguintes pessoas, que proferiram saudações em nome de seus governos: da Bélgica Sr. Martens; da Alemanha — Dr. Herrmann; da Hungria — Sra. Barbara Serenitot; do Iran — Sr. Hamit Enayat; da Iugoslávia — Sr. Peter Vukomanovic; da Holanda — Sr. engenheiro Isbruker; da Noruega — Cap. Bugge Paulsen; da Suécia — Sr. Ebbe Vilborg; e da Grã-Bretanha — S. Exa. o parlamentar Jones.

Saudaram os congressistas os representantes de sociedades esperantistas dos seguintes países: da Argentina — Sra. Rosa Scolnik; da Áustria — Sr. Tentmeister; da Bélgica — Senhorinha Terriijn Juliette; do Brasil — Sr. Francisco de Souza Almada; da Grã-Bretanha — Sr. Victor Sadler; da Bulgária, Sr. Atanas Lakov; da Dinamarca — Prof. Paul Neegaard que, além da saudação, fez especial convite aos congressistas para tomarem parte no 47.º Congresso Universal, a realizar-se no seu país no próximo ano, na cidade de Copenhague; da Finlândia — Sr. Kostiainen; da França — Sr. Jacques

Rousseau; da Alemanha — Sr. Richard Hirsch; da Itália — Sr. Joseph Grattapaglia; do Japão — Prof. Hideo Yagi, este, por sua vez, convidou os presentes a “irem economizando dinheiro para que possam tomar parte no 50.º Congresso Universal, que terá lugar no Japão, em Tóquio; da Iugoslávia — Sr. Prof. Boja Popović; do Canadá — Senhorinha Vilma Eichholz; de Madagascar — Sr. Laurent Ramialison; da Holanda Sr. E. de Wolf; da Suécia — Sra. Ester Andren; da Suíça — Sra. Anita Mase; dos E. Unidos — Sr. Mark Starr.

Alguns representantes de sociedades não filiadas à U.E.A. também usaram da palavra, bem como de países com movimento não organizado: Hungria, Sr. Julio Baghy; Irlanda, Sr. Oh Uiginn; Israel, Sr. Bernard Swarsenski; Marrocos, Sr. Charles Thollet; México, Sr. Havalos e África do Sul, Sr. Woodruff.

No encerramento da sessão de abertura falou o Prof. Ivo Lapenna, proferindo oração inflamada, cheia de entusiasmo contagiante como só é capaz o seu talento.

Cantou-se, em seguida, o hino “La Espero” acompanhado pelos mil e tantos esperantistas presentes.

Após o encerramento dirigiram-se os participantes dos trabalhos para o Jardim Montpellier Parade, a fim de fazer a já famosa fotografia panorâmica dos congressistas.

Com relação aos trabalhos que se seguiram, cumpre assinalar que eram em grande número as comissões que cuidaram deles.

Foi apurado, por exemplo, que em 400 escolas de 27 novos países o Esperanto vem sendo ensinado com assiduidade e que 4 novos países estão provendo a introdução do seu ensino nas escolas, nas seguintes condições:

O EVANGELHO segundo São João e
O SERMÃO da MONTANHA segundo
São Mateus.

Texto bilingue — Esperanto e portu-
guês — muito próprio para estudo com-
parativo.

Últimos exemplares — enc. Cr\$ 250.00.

ALVOKO

INTERNACIA LIGO DE ESPERANTIS-
TAJ FOTOFILMAMATOROJ, konsistanta
el foto-filmamatoroj el 40 nacioj, alvokas
je aliĝo ĉiujn esperantistojn kiuj okupas
sin pri fotografado kaj filmado.

Esperanto-I. L. E. F., Budapest 119, Pk
6, Hungario.

SUDTIROLO EN LA JARO 1960

La Aŭstria Ambasadro en Rio de Janeiro
sendis al Brazilo Esperanto-Ligo 60
ekzemplerojn de la interesa broŝuro
"Sudtirolo en la jaro 1960", speciale por
esti disdonataj al 50 Esperantistaj aso-
cioj filiitaj al BEL.

ANONCETO

40-jaran jubileon festos baldaŭ "Es-
peranto-Societo Sukceso", en Vratza,
Bulgario. Skribu amase propagandcele
je temo: "Kion mi scias pri Bulgario
kaj per kiu fonto?" La skribintoj ricevos
respondon.

Holanda, facultativamente; na Iugos-
lavia, oficialmente; na Noruega, ofi-
cialmente em uma escola e na Suécia,
facultativamente.

O caso da Iugoslávia causou ótima
impressão, por isso que o ensino do
Esperanto nesse país é encarado sê-
riamente, e, diga-se de passagem, no
46.º Congresso eles tiveram papel re-
levante, quer nos trabalhos própria-
mente, quer na parte artística, fa-
zendo comparecer uma bela trupe
de artistas que muito alegraram os
congressistas.

(Continua no próximo número).

ESPERANTA GAZETARO

Dum la jaro 1960 ni ricevis la jenajn
Esperantajn gazetojn kaj revuojn: Ame-
rika Esperantisto, Argentina Esperantis-
to, Australian Esperantist, Aŭstria
Esperanto-Instruisto, Atualidades Espe-
rantistas.

Belga Esperantisto, Boletín de la Fe-
deración Esperantista Española, The
British Esperantist, Bulgara Filmo, Bul-
gara Esperantisto, Bulteno Esperantista
Praha, Bulteno de Esperantistaj Kam-
padistoj.

Dia Regno, 14-a de julio (Morro
Agudo).

Esperanto (USA), L'Esperanto (Itala),
De Esperantist (Haag), Esperanto en
Skotlando, Esperanta Finnlando, La Es-
pero (Svenska), Espero Katolika, Espe-
ranta Bulteno, Eta Bulteno, Flandra Es-
perantisto, Franca Esperantisto, Franca
Katolika Esperantisto.

La Gazeto (franca), Germana Espe-
ranto-Revuo, Guatemala Esperanto-Bul-
teno.

HELS (hispana), Heroldo de Espe-
ranto.

Informilo el Bratislava, Informilo de
I. E. Muzeo de Wien, Informilo de Para-
ná Esperanto-Asocio, Internacia Fervo-
jisto, Internacia Ĵurnalisto, Intersteno.

Jugoslavia Esperantisto, La Juna voĉo.
KTP. Kultura Kajeroj, Laborista Espe-
rantisto. La Lampiro, La Libera Espe-
rantisto, Liberigo de Mizerio, Nia Ligilo
(Israel). La Migranto, la Mondcivitano,
La Movado.

Nederlanda Esperantisto, Norvega Es-
perantisto, Nordamerika Esperanto-Re-
vuo, Nuntempa Bulgario, La Nica Lite-
ratura Revuo, New Zealand Esperantist,
Norda Prismo.

Oomoto.

Paco, La Plugilo, Pola Esperantisto, El
Popola Ĉinio, Poŝta Telekomunika Revuo,
La Praktiko.

Revuo Orienta.

Sat-Amikaro, Sennaciulo, Semado,
Svisa Espero La Skolta Mondo, La Suda
Stelo, Nia Stelo, Sennacieca Revuo.

Tamen (pola).

Vivo kaj Sano (greka)

Voĉo de Islando.

Worker Esperantist.

? LA MISTERO ROMANO

Afrânio Peixoto, Coelho Neto, Medeiros e Albuquerque kaj Viriato Correia

XLIV

BRULEGO!

En tiu tago Albergaria sentiĝis sin malsaneta. Tuj kiam li ellitiĝis, li rapide iris al la telefono en la najbara vendejo, faris komunikon kun la policejo kaj petis de la dejoranta komisaro, ke li sciigu al Eneias lian malsaneton. Estis dimanĉe. Li volis resti hejme por ripozi.

En la najbaraĵo loĝis la maljuna Teresa, lia amikino de multaj jaroj. Kiam li malsaniĝis, la maljuna Teresa ĉiam venis zorgi pri lia domo kaj liaj manĝoj. Ŝi estis kompatinda virino — alta, mal-dikega, malzorgema kaj distrigema. Ŝia distreco estis tiel granda, ke kelkfoje ŝi ne metis salon en la manĝaĵojn, ke ŝi preparis la tagmanĝon nur je la horo de la vespermango. Tamen ŝi estis efektive bona persono.

En tiu tago, kiam Albergaria venigis sin por prepari al li la manĝojn, ŝi estis tre okupita. Ŝi devis fini la gladan de kelkaj tolaĵoj. Ŝi decidis iri kaj fini la laboron en la domo de Albergaria.

La murdinto de Sanches Lobo pasigis tedegan dimanĉon. Sidanta en la malgranda ĉambro, li ree etendis la membrojn kaj aŭdadis la voĉon de la maljuna Teresa, kiu kantis en la kuirejo, dum ŝi gladis la tolaĵojn de la klientoj.

Plurfoje li provis preni la monon el la kaŝejo. Tio estus senprudento. La maljunulino povus vidi kaj, kvankam ŝi estis kompatinda virino, ŝi ja estis virino kaj certe scivolema. En tiu tempo li jam sentis deziregon pri la riĉaĵo, kiun li konservis en sia domo. Li ne sin regis ĉe la volo ĝui.

Kaj estis reale stulte, ke li, kiu havas riĉaĵon ĉe sia flanko, trafeblan per sia mano, suferadis malriĉegulan vivon, sen iu ĝuo, sen iu plezuro, elportante la pezajn servojn de la polico, dormante en tiu malvasta domo kaj aŭdante la senspritaĵn kantojn de la maljuna Teresa.

La uragano jam pasis: la polico havis en siaj ungegoj Petron Linck, kiu kon-

fesis, ke li estas la murdinto de Sanches Lobo, kaj tio sufiĉis. Por la polico la sola priokupiĝo estis ekkapti iun farinton de la krimo, ĉu la vera, ĉu ne.

Albergaria neniam plu povus esti ĝenata. Jam estis tempo por komenci la ĝuadon de la mono, kiun li forprenis de la fia ruiniginto de sia familio.

Sed ĉu ne povus ŝajni eksterordinara al multaj kaj precipe al Eneias Cabral, ke li, kompleta mizerulo, tute subite vidiĝas en pozo de riĉulo? Sed li havis planon. Li aĉetos loterian bileton. Li montros la bileton en la Policejo al ĉiuj, precipe al Cabral. Dum du aŭ tri tagoj li parolos montrante sian konvinkon pri tio, ke li ricevos la grandan premion. Kaj unu tagon li konigos al siaj kunuloj, ke li ricevis iun premion — kvin aŭ ses mil milrejsajn, malgrandan premion, por ne altiri la atenton kaj ne vekti scivolon al konfirmo.

En tiu tago, venante en la Policejon, li eniros ĝojega, ekscitita, bruema, dirante, ke li jam ricevis la monon. La demando pri la numero de la bileto, kiun iu aŭ alia el liaj scivolaj kunuloj, povus fari, estus neebla, ĉar la bileto ne plu estis en liaj manoj.

Kaj tio breĉis al li por komenci elspezi.

La tutan tagon li pasigis konstruante la planon. Jen li trovis ĝin bonega, jen li ĝin forjetis; denove li trovis ĝin belega kaj ĝin plibonigis ĉi tie kaj tie.

Vespere li sentis la volon foriri sur la straton, Li vestis sin.

La maljuna Teresa estis fininta siajn laborojn kaj aranĝis la tolaĵojn por reiri hejmen.

— Ĉu vi lasis ĉion en bona ordo, sinjorino Teresa?

— Jes.

— Ĉu vi ne forgesis ion? Ĉu vi lasis ĉion en ĝia loko?

— Jes.

Albergaria iris al la plej proksima stratangulo, kie estis triviala antaŭurba kafejo. Pasis knabo vendanta la ĵurnalon *A Noite*.

Li aĉetis la ĵurnalon kaj malferminte ĝin ektimis. Tie aperis kun grandegaj titoloj la novaĵo de la posttagmezo:

Petro Linck, la murdinto de Sanches Lobo, forkuris el la malliberejo.

Albergaria avidege kaj rapide legis la raporton. Ĝi estis la tuta rakonto pri la forkuro kun ĝiaj detaloj.

Petro Linck estis seginta la kradojn de sia ĉambreto kaj alivestita kiel poli-

cisto trairis la korton de la malliberejo kaj atingis la straton. Nur je la horo de la revuo oni rimarkis lian foreston. Kolonelo Meira Lima estis furioza kaj la Polico en granda konfuzo.

Albergaria sentis la neceson tuj kuri al la unua helpa delegito. Eneias devis bezoni lin en tiu momento. Sed la tramveturilo al la urbo ĵus pasis. Li devis atendi almenaŭ duonhoron.

Li sidigis.

Post dek minutoj li aŭdis bruon eksterre. Popolamaso kuris laŭ la direkto al la strato, kie estis lia domo.

— Brulego! brulego! — oni kriis.

Albergaria starigis. El ĉiuj tiuj antaŭurbaj dometoj eliris homoj, amaso da infanoj, amaso da virinoj, kriante:

— Brulego! brulego!

Li akompanis la ondon. Kiam li turnis la stratangulon, lia koro eksaltis en la brusto. Lia dometo brulis.

Li komprenis ĉion. La maljuna Teresa, kiu gladis dum la tuta tago, lasis kardadaĵojn apud io facile bruligebla.

Krio eliris el lia brusto. Li rompis la popolamason kiel fulmo. La tuta domo — antikva domo el tre malnovaj lingnaĵoj — estis ununura flamo.

Li volis meti teren la pordon kaj eniri. Neeble. La fumo sufokis lin. Li falis, malkuraĝigite, en la brakojn de iu el la popolamaso.

Malproksime oni aŭdis la kuraĝan kaj kvazaŭfrenezan tintadon de la Fajrobrigado, kiu estis alvenanta.

VIRIATO CORREIA. *Tradukis K.*

NASKIGO

La 14-an de julio naskiĝis Luiz Maluf Wutke, la 10-a ido de geedzoj Wutke, en Uberlândia, Stato Minas Gerais.

Luís, same kiel la antaŭlasta Hernane, estas denaska esperantisto. Niajn gratulojn kaj bondezirajn.

ASOCIO POR BATALO KONTRAŬ LA KANCERO.

Brazila Esperanto-Ligo kun la celo kunlabori por la nobla kampanjo realigata de Asocio por Batalo kontraŭ la Kancero de Rio de Janeiro kaj laŭ sugestio de nia samideanino F-ino

BRAZILA KLUBO ESPERANTO

Por festi la 55-an datrevenon de B.K. E. oni okazigis la 1-an de Julio memorigan kunvenon. Unue la ĝenerala sekretario parolis pri la fondo de la klubo kaj montris al la ĉeestantoj diversajn historiajn dokumentojn, kiuj vekis grandan intereson precipe tiu enhavanta la nomojn de la fondintoj: Everardo Backheuser, Alberto Couto Fernandes, Nuno Baena, Venâncio Silva, Arruda Beltrão kaj aliaj.

Poste oni aŭdis plezure kaj emocie verkojn de kelkaj membroj de la klubo, prezentitajn de jenaj samideanoj:

D-ro José Antonio de Albuquerque: "Destino" de Nuno Baena;

F-ino Irani Baggi de Araujo: "La miozoto" (de R. Sandoval) trad. de A. Caetano Coutinho;

S-ro Alfredo Maceira Rodrigues: "Distrigema Profeso" de Magim Zubieta;

S-ro Wellington Medeiros de Moura: "Malriĉa sed Fiera" de Floriano Pessoa.

Sekvis malgranda intertempo dum kiu Kol. J. Campos de Oliveira, reliefigis la laboron de Gen. Geraldo Pádua kaj de D-ro Floriano Pessoa, du sindonaj esperantistoj al kiuj B. K. E. multe ŝuldas.

Daŭrigante la literaturan parton, S-ino Irene Machado da Silva kaj S-ro Joel Manso ludis la komedion "Amo per Proverboj" de Arthur Azevedo, esperantigita de A. Couto Fernandes. La ĉeestantaro forte aplaudis.

Popolaj muzikoj tradukitaj en Esperanton de la nuna prezidanto de B.K.E. Prof. J. B. Mello e Souza gajigis ĉiujn kaj per kantado de "La Espero" finiĝis la kunveno.

Lila Teixeira, Fakdelegitino pri Turismo, donacis plurajn esperantajn librojn kaj aliajn materialojn por vendado en la Foiro organizita de tiu Asocio.

Dum la monato Julio niaj libroj montriĝis en budo kaj estis aĉetataj de la granda publiko, altirita de la interesa Foiro.

APERFEIÇO E O SEU CONHECIMENTO NEKROLOGO

LA ARBARO

Celso Magalhães

Estas matene.

Heligita de la granda lumo, kiu iom post iom orumas ĝiajn suprojn, sukoriĉa pompas la praarbaro.

Kiu iam vojaĝis tra la nordo de Brazilo, tiu certe rimarkis la profundan sovaĝecon de ĝiaj arbaroj kaj resopiras tiun malprecizan murmuraĉon, kiun oni en ili aŭdas, tiun konfuzan kunecon de montaraj harmonioj, kaj ankaŭ raviĝas ĉe la rememoro de la akra, saniga, viviga aromo de iliaj centjaraj arboj.

La arbaroj ne havas la ornamkokecon, per kiu sin vestas la ebenaĵoj, nek la festan kaj ĉiam freŝan gajecon de la kamparoj, kie la okuloj kelkfoje serĉas, en la nebulitaj finoj de la verda harbaĵo aŭ de la junkaro, ondanta voluptaj kurbiĝoj, la randon de la palmaro, kiu signas al ni de malproksime.

Nenion similan ili havas.

La imponeco de ĝia aspekto igas nin rigardi la praarbaron kun respekto kaj admiro.

La trunkoj levigas firme, rekte, rigide, fiere, kiel reĝoj, kiaj ili ja estas, de tiuj senhomaj regionoj, kaj, for en la alto, ili disetendas la foliaron, interplektas la branĉojn, formante grandegajn baldakenojn el verdaĵo, kiuj iafoje sentas la malvarman kison de la ĉiunuancaj nuboj, kiuj ilin de proksime amindumas.

La alteco de la trunkoj kvazaŭ volas bori la spacon, kaj la aroganta stareco de ilia figuro spitas la atakojn de furiozo de la tempestoj.

P.C.N

Eis a versão, em Esperanto, do belo trecho inserto no número anterior.

Generalo Louis Bastien

Mortis la 10-an de aprilo, en sia hejmo, en Parizo, en la aĝo de 91 jaroj, Intendanto-generalo Louis Bastien.

Li naskiĝis la 21-an de decembro 1869 en Obernal, apud Strasburgo. Esperantisto de 1902, li sin okupis multe pri la propagando en Francujo. Vicprezidanto de Societo Franca por la propagando de Esperanto; honora prezidanto de UEA; Lingva Komitato kaj Akademiano. Li verkis la bonegan Naŭlingva Etimologia Leksikono (1907) kaj tradukis verkon de Bossuet kaj kunmetis poŝvortareton por francoj. Ĉefkunlaboranto de la Enciklopedio.

Petro Stojan

La 3-an de majo mortis en Nice, Francujo, Petro E. Stojan, naskita 22 junio 1884, en Ismail, Besarabio. Kompetenta, klera esperantisto, aŭtoro de "Bibliografio de Internacia Lingvo" (1929), de "Deveno kaj Vivo de la Lingvo Esperanto" (1953), de "Ornitologia Vortaro Oklingva de Birdoj Eŭropaj", de "Rusa Esperanto-Vortareto" kaj aliaj verkoj. Membro de L. K. de 1914.

"LA SUDA STELO"

La redaktoro de la leginda revuo "La Suda Stelo" (Ljubliana, Jugoslavio) skribis, ke li deziras la kunlaboron de brazilaj samideanoj. Li esperas, ke lia ideo estos akceptebla.

BRAZILA KRONIKO

PERNAMBUCO

Recife — Associação Pernambucana de Esperanto elektis kaj enoficigis novan estraron por la periodo 1961-62: Prez. Francisco Ristal; 1-a vic.-prez. Pastro José Nogueira Machado; 2-a vicprez. Renato Furtado; ĝen. sek. Moacir Cunha; 1-a sek. Johano Gonçalves de Araujo; 2-a sek. Zuila Lins; kas. José Inácio Pereira de Andrade; bibl. Gabriel de Oliveira.

MINAS GERAIS

Araçá — Nia samideano Sepas-tião Alves Moreira daŭrigas la E-propagandon, pri kiu ni rakontis en nia n-ro april-junia 1959. Li faris paroladon pri Esperanto ĉe la loka "Rotary Club"; kaj disdonis al ĉiuj ĉeestantaj rotarianoj ekzemplerojn de la broŝureto "Chave de Esperanto".

Uberlândia — El letero de nia vigla sam. C. A. Wutke ni transkribas la jenajn liniojn: "Esp. kursoj — Dum tiu ĉi jaro la varbitaj Esperantistoj estas amase, kaj la nombro de interesatoj kreskas ĉiam, ne nur ĉi tie, sed precipe videble en najbaraj urboj. Post la fina ekzameno ĉiuj aliĝos al BEL! Kore ni tute deziras partopreni kiel anoj de nia glora nacia organizo kaj kunlabori en ĝia brila laborado!"

STATO RIO DE JANEIRO

Rezende — Sub la gvido de la poetino kaj profesorino Nerilda Muela Camejo, Rezende Esperanto-Klubo organizis novan elementan E-kurson.

Nia samideano Sergento Roland Ferraz, el la Bataliono Suez, kiu ve-

turis al Mezoriento, uzis brile kaj utile nian internacian lingvon, dum lia vojaĝado.

Ĉe la amfiteatro 301 de A. M. A. N. (Akademio Militista Agulhas Negras) oni inaŭguris E.-kurson: Inicis ĝin la kadetoj Haroldo, Sérgio kaj Colares.

Volta Redonda — La Praktika Kurso de Esperanto, organizita de Lions, Clube de Volta Redonda, kun la helpo de Volta Redonda Esperanto-Klubo funkciis de la 10-a de januaro ĝis la 21-a de aprilo, sub la gvido de nia sindona samideano inĝ. Alberto Flôres, en la Teknika Lernejo Pandiá Calogeras, de Companhia Siderúrgica Nacional. Enskribiĝis 34 lernantoj, sed pro diversaj cirkonstancoj nur 12 finis la kurson.

SÃO PAULO

Itapeva — La 2-an de julio oni komencis lernigi Esperanton (strato Dom Luiz de Souza, 73), laŭ informo de S-ro Francisco Panis.

Santo André — La 27-an de majo. S-ro José Dias Pinto faris paroladon pri Esperanto en la Biblioteca Municipal, sub la aŭspicio de la Gremio Estudantil Senador Flaquer.

São José dos Campos — Ĉe la Jura Fakultato de Vale do Paraíba funkciis elementa E-kurso, kun kontentiga rezultato. Verda Esperanta Societo, kiu ĝin organizis, baldaŭ komencos novan kurson.

Sorocaba — Nia sam. Carlos de Mattos starigis ferian kurson de Esperanto en la Sociedade Beneficente 25 de Dezembro.

PARANA

Curitiba — Akceptante la proponojn de siaj kasistoj, Paraná Esperanto-Asocio decidis starigi specialajn kurantajn kontojn por ĉiuj P. E. — anoj, membroj de Universala Esperanto-Asocio, kiuj devas pagi al tiu internacia organizado la jaran kotizon, kiu estas iom peza por la plimulto de la membroj de PEA. Tiu konto ebligas, ke ili ŝparu ĉiumonate nedifinitan monsumon por tiu celo.

— Ĉe la Centro Spiritista Ildefonso Correia (strato Visconde de Guaraçuva) funkcias Esperanto-kurso, kiun direktas nia sam. Napoleão de Araujo.

— Vojaĝante per ŝoseo al la XVII-a Brazila Kongreso, en Porto Alegre, D-ro Carlos Domingues, Prezidanto de B.E.L. kaj la Kasistino F-ino Irani Baggi de Araujo haltis en Curitiba, kie ili vizitis en lia famkonata stelforma domo ĉe la strato Zamenhof nian karan veteranon S-ron Augusto Gonçalves de Castro, kiu kun sia familio kore akceptis la vizitantojn. D-ro Domingues ankaŭ renkontigis kun niaj samideanoj D-ro Francisco Portugal, Gert Drucker kaj João Maria Fontoura kaj traktis kun ili aferojn de la Movado. Kun la grava librejo *Livraria Universitária* li faris interkonsenton pri la vendo de Esperantaj libroj.

SANTA CATARINA

Florianópolis — La Prezidanto de B.E.L. uzis la okazon viziti la urbon por interrilatiĝi pri la tiea Movado kun S-ro Walter Boppré kaj la juna Carlos Faraco, filo de nia karmemora samideano Giovanni P. Faraco. Oni interparolis pri la paŝoj necesaj por la revigligo de la Movado, iam gvidata de la kara mortinto.

RIO GRANDE DO SUL

Porto Alegre — D-ro Carlos Domingues en la societo de Finoj Maria do Amaral Malheiro, Irani Baggi de Araujo kaj Araci Baggi de Araujo vizitis nian sindonan samideanon D-ron Benjamin Camozato, kiu pro malsano ne povis ĉeesti nian Kongreson. Nia senlaca samideano, kiu ĉiam laboras por nia afero, montriĝis kortuŝita pro la esprimo de amikeco.

— Kune kun Prof. Ernâni Correia, la Prezidanto de B.E.L. faris viziton al la librejo *O Globo*, unu el la plej gravaj en Latinameriko, kie li parolis kun S-ro Henrique Bertaso, pri eldonado kaj vendado de Esperantaj libroj. La firmestro akceptis afable kaj simpatie la vizitantojn kaj montris grandan intereson pri la afero.

— D-ro Carlos Domingues kaj kongresaninoj el Rio de Janeiro volis koni la straton Zamenhof kaj la placon Esperanto. La unua kuŝas en la eleganta urboparto Floresta kaj la dua, kvieta kaj kun belaj herbobedoj, situas en Partenon, meze de la strato Tobias Barreto.

BRASÍLIA

Distrito Federal — En *Taguatinga* (ĉirkaŭaĵoj de la Brazila ĉefurbo) estas starigita elementa Esperanto-kurso, kun dekoj da lernantoj.

NOVIDADE

BILD-LIBRO PRI BESTOJ

Edição do *Daily Mail*, de Londres. Ricamente ilustrado com desenhos de 13 famosos desenhistas ingleses. Texto em Esperanto de Gething, Capp e Butler.

Um livro admirável, ideal para presente. Formato 26 x 36. Encadernado. Cr\$ 1.050.00.

BIBLIOGRAFIO

C. WALTER, ESPERANTO LA LINGVO INTERNACIA FACILA POR VI. Internacia legolibro de la internacia lingvo. Amuza libro por lerni sen instruisto. Laŭ la rekta metodo. 15 X 21 cm. 120 p. Editions Nova, Mulhouse, Francujo. Nova eldono de la libro aperinta la unuan fojon en 1932, kun la titolo "Gaja lernolibro de Esperanto". Enkonduka klariga teksto verkita en 12 lingvoj: angla, dana, Esperanto, finna, franca, germana, hispana, itala, nederlanda, norvega, portugala, sveda.

MANNTALID 1703 — Gfid ut af hagstofu Islands. Reykjavik — 1960 60 p. grandformato. Kun angla lingvo kaj Esperanto. Verko pri la unua popolnombro en Islando, en la jaro 1703, kies tuta materialo konserviĝis bone ĝis nun.

La nombro de la tuta loĝantaro estis 50.358. Tiutempe, preskaŭ la tuta islanda popolo estis okupata je brutobredado kaj fiŝkaptado.

Marcel Pagnol: TOPAZE; Charles Vidrag: **LA SIEGO TENACITY.** El la franca esperantigitaj de Roger Bernard. Prezntis la aŭtorojn Gaston Waringhien, J. Régulo eld. La Laguno, Kanariaj Insuloj, 1960. 22,5 X 15 cm. 282 p.

Bonegaj tradukoj de du teatraĵoj — la fama komedio Topaze, "Satiro de la politikaj moroj putrigitaj de la monaferoj", kaj la drameto 'Le Paquebot Ténacity', kiu konis grandan sukceson.

William Auld: Unufingraj melodioj, Skizo de John Francis pri la aŭtoro. Ilustraĵoj de David Hastie Young. Stafeto. J. Régulo, eld. La Laguna. 1960. 128 p. 19 X 12 cm.

Libro originale verkita en Esperanto. Elektitaj liriko, teatro, koncerto por unu fingro kaj orkestro. "La versoj de Auld fluas facile kaj subtile, ĉiam kasaŝante sian efektivan signifon — kompakto sub la rafinita eleganto". (J. Francis).

Peter Giunio. SEKRETOJ DE LA MARESTAJOJ. Reverkita de Lic. Marinko Ĝivoje. Eld. Kroatia Esperanto-Servo, Zagreb, 1960, 144 p. (15 X 22,3 cm.) 73 bildoj.

Nova valoro verko, unika pri fiŝoj en Esperantujo, eldonita sub aŭspicioj de U. E. A. "Scienca laŭ enhavo, beletra

laŭ vestaĵo. Enkonduko de nia klera samideano, la argentina sciencisto E. Balech: La aŭtoro per lerta mano gvidas nin tra misteroj de la mara vivo".

DRAGO KRALJ. Kvar prelegoj pri Esperanta literaturo. Eldona Sekcio de Slovenia Esperanto-Ligo. Ljubljana, 1960, 190, p.

Kvar prelegoj, kiujn la aŭtoro prezentis al la partoprenintoj de instruista seminario en Polzevo! "Lingvo kaj literaturo (Esperanta literaturo antaŭ la unua mondmilito)"; "La venko de poetoj (E.-poezio inter la du mondmilitoj), Modernaj melodioj (E.-poezio depost la dua mondmilito); "De romano al novelo (E.-prozo depost la unua mondmilito ĝis hodiaŭ). Aldono: E.-literaturo en Jugoslavio — Antologioj en Esperanto.

FAKTOJ PRI GERMANUJO. Aŭtoro: Prof. D-ro Helmut Arntz. 80 paĝoj kun multnombraj gravuroj — 36 paĝoj ilustritaj. 15 X 21 cm. Dua aktualigita eldono, eldonita de la gazetara kaj informacia oficejo de la Federacia Registaro.

Kompletaj ilustritaj priskriboj pri la Germana Regno, politiko, ekonomio, sociala vivo, kulturo, strukturo de la Federacia Respubliko Germanujo. Havebla ĉe Franz Steiner Verlag, Wiesbaden, Bahnhof Strasse 39, Germanujo.

Seattle invitas vin! Ilustrita prospekto pri la 9-a Kongreso de ELNA (Esperanta Ligo de Nord-Ameriko), en alloga, bela ferieja urbo Seattle. Eldonita de Hotelo Doric Mayflower (Seattle I, Washington, Usono).

To Hoai. LA GEEDZOJ A. FU. Trad., Nguyen Minh. Kinh. Hanojo, Vjetnamio. Fremdlingva Eldonejo. 1960. 190 p. (13 X 19 cm).

Premio 1954-1955 de Asocio de vjetnamaj verkistoj kaj artistoj. Tri rakontoj: La geedzoj A. Fu; Savu nian teron, savu nian vilaĝon; Muong Jon, pri la taj-nacimallmultigo en la aŭtonomia regiono Taj-Meo (Nord-Okcidento de Vjetnamio).

PIERRE DELAIRE — L'Espéranto fil d'Ariane du coeur et de l'esprit.. Antaŭparolo de Prof. Maurice Lavarenne kaj Mesaĝo de la madagaskara Ministro G. Randrianasola. 196 p. 13,5 X 21 cm. 1959. Centre National Esperanto-Office, Orléans, Francujo.

Bonega, laŭdinda libro verkita de la aŭtoro en du lingvoj (franca kaj Espe-

ASSOCIAÇÃO BAHIANA DE ESPERANTO

De conformidade com a resolução tomada em Assembléia Geral Extraordinária, em 5 de dezembro de 1960, o artigo 12 das Disposições Gerais dos Estatutos da Associação Bahiana de Esperanto ficará composto com a seguinte redação:

Artigo 12 — Em caso de dissolução da Associação Bahiana de Esperanto, os seus haveres serão incorporados ao patrimônio da Liga Brasileira de Esperanto (Brazila Esperanto-Ligo), com sede no Rio de Janeiro, Estado da Guanabara, à Praça da República, n.º 54, 2.º andar.

12-A TUTAMERIKA KONGRESO DE TUBERKULOZO

Tezo kun resume en Esperanto

La eminenta kuracisto D-ro Fernando Diaz, Direktoro de la Medicina Departamento de la grava firmo Brazila ESSO de Petrol, prezentis al la 12a Tutamerika Kongreso de Tuberkuulozo, kunveninta en Salvador, Bahia, de la 10-a ĝis la 16-a de Julio 1960, tezon sub la titolo "Estonteco de la laŭŝajne sanigita tuberkulozulo" kaj kun resume en la lingvoj angla, portugala, hispana, franca kaj Esperanto.

La tezo, kiu estis aprobita baldaŭ aperos presita en broŝuro.

Ankoraŭ unu fojon do la Internacia Lingvo estas uzita en nia lando por scienca objekto.

ranta), memore al D-ro L. L. Zamenhof, okaze de lia centjara naskiĝa dato. Konsilinda legado, ne nur al ĉiuj, kiuj scias la du lingvojn, sed ankaŭ al tiuj, kiuj konas unu el ili. En la fino estas aldono kun interesaj demandoj kaj respondoj, kaj resume de la Esperanta gramatiko.

EKSPOZICIO DE POLAJ LIBROJ EN RIO DE JANEIRO



La rektoro de la Universitato de Brazilo kaj la Centro de Universitatoj Studoj kaj Interŝanĝo (Brazilo-Pollando) organizis solenon por celebri la Tagon de Pollando, kiu okazis en la Palaco de la Rektorejo de tiu Universitato kaj ankaŭ, en la sama tago estis inaŭgurita ekspozicio de polaj libroj, kiu daŭris unu semajnon.

Por la ekspozicio Brazila Esperanto Ligo pruntedonis el sia Biblioteko plurajn polajn librojn tradukitajn en Esperanto (inter ili La Faraono, Quo Vadis kaj Sinjoro Tadeo), kiuj estis plezure akceptitaj de la organizintoj. La Esperanto-Fako, kiu estis aranĝita de F-ino Lila Teixeira, fakdelegitino de UEA, tre plaĉis al la multaj vizitantoj. La b'ido montras parton de la ekspozicio kun portreto de Zamenhof kaj esperantaj libroj kaj revuoj.

NOVIDADE

Livro de granda actualidade sobre importante problema.

LA ZAMENHOFA ESPERANTO Simpozio pri-Ata-Ita

Notáveis trabalhos de 11 eminentes esperantistas.

Preço — Cr\$ 1.400,00.

R E C E N Z O

LINGVO KAJ VIVO — Originale verkita de *Gaston Waringhien*. Eldonis *J. Régulo*, La Laguna, 1959. Broŝ., 16 x 22 cm, 450 paĝ. Mendebla al Libro-servo de BEL; prezo Cr\$ 1.575,00.

Siajn esperantologiajn eseojn, pluraĵoj el kiuj jam aperis inter 1928-1957 kiel gazetaĵoj artikoloj, la aŭtoro nun prezentas dividitajn en tri partojn: *Nia Lingvo*, *Niaj Problemoj*, *Niaj Perspektivoj*.

En la unua parto li komencas per la evoluo de la idiomo antaŭ ĝia publikiĝo en 1887. Ĉefe per esploro de la pratipoj de 1878 kaj 1881 li sukcesas "havigi al ni klarigojn pri tiu aŭ alia enigma trajto de la nuna lingvo, kaj krome informi nin pri la maniero, kiel Zamenhof iom post iom akiris pli da sperto kaj eliminis malĝustajn solvojn". Sekvas metoda studo de la etimologio de niaj gramatikaĵoj: finaĵoj de substantivo, adjektivo kaj adverbo; konjugacio; pronomoj kaj korelativoj; primitivaj adverboj, prepozicioj kaj konjunkcioj; afiksoj. Tiam Waringhien pritraktas la konsiston de la vortaro, la rolon de la Fundamento, la vortkonstruon, la aglutinan naturon de nia lingvo, la apartaĵojn de la frazo, kaj la akuzativon kies ekzisto estas bonege pravigita.

Nia Lingvo donas valorajn elementojn por pli intima familiariĝo kun la esenco de Esperanto, kaj argumentojn, por rebati kritikojn de personoj, bone instruitaj, sed nesufiĉe informitaj, kiuj ofte vidas plibonigojn por la idiomo en solvoj siatempe konsiderataj, sed poste forlasitaj de Zamenhof.

La dua parto estas la ekzameno de kelkaj gravaj, ankoraŭ ne kontentige solvitaj demandoj de la lingvo, kon-

dukita ne en la maniero pli kutima — opinio kaj pravigo — sed per aplikado de la moderna metodo: esploro de ĉiuj koncernaj aspektoj kaj faktoroj, kiuj kondiĉigas la decidon, listigo kaj diskutado de la jam provitaj kaj de la eblaj solvoj, kaj konkludo, konsistanta el la persona opinio komplete sed koncize esprimita. Tiele Waringhien pritraktas la problemojn: landnomoj, participoj en *ita-ata*, verba modo poste *malhelpi* kaj *kvazaŭ*, sufikso *end*, esprimoj *dum kiam* kaj *ĝis kiam*, prepozicioj uzataj prefikse, nomo de la literoj, neologismoj, kaj editorado de verkoj por eldono.

Eble oni ne samopiniis kun la aŭtoro pri kelkaj el liaj konkludoj en *Niaj Problemoj*, sed li certe multe helpas al pli klara vido en tiuj aferoj, oftaj temoj de gazetara polemiko.

En la tria parto li unue demonstras, ke la strukturaj, sencaj kaj sociaj problemoj de la naciaj lingvoj neniel permesas la internacian komprenigon akcepteble efektivigitan pere de la terure malfacila kaj tute ne fidinda samtempa interpretado aŭ, tiom malpli, pere de la utopia tradukmaŝino. Poste li komparas Esperanton kun la projektoj de lingvo internacia, kaj trankviligas nin pri la nepra venko de nia idiomo, garantiata de la akirita vivanteco, kiu jam agas kiel forto de inercio favore al ĝi. Fine Waringhien faras historian skizon de la movado, por konkludi el tio la konduton, la vojon sekvendan de ĉiuj samideanoj, kaj difini tion, kion ni rajtas esperi de la estonteco.

Sentroyge ni povas diri, ke tiun verkon devas posedi ĉiuj niaj instruistoj, ĉefe de superaj kursoj, kaj same tiuj, kiuj prenas sur sin la delikatan taskon diskonigi la internacian lingvon en la intelektaĵ medioj.

La valoro de la libro kredeble indulgigos al la lernantoj la iom tro

nombrajn prezerarojn, ne ĉiuj kiuj estis postkorektitaj.

G. P.

Martinus — "FOLIOJ EL LA BILDOLIBRO DE DIO" kaj "PENTEKOSTA BRILO SUPER LA VIVO". Du libretoj presitaj kaj binditaj kune en unu volumo. El la dana originalo tradukis C. Graversen. Eldono de La Spirit-Scienca Instituto de Martinus — Kopenhago 1958. Bind. 94 p. 12 x 18,5 cm. Prezo en la libroservo de BEL Cr\$ 420,00.

La unua libreto instruas, ke ĉio en la naturo estas bildoj el la Bildolibro de Dio, montras la ekziston kaj la ĉieĉeston de Dio. La homo ankaŭ estas bildo de Dio kaj eterna kiel Dio mem, sed plej ofte li ne akiris ankoraŭ altan evolustaton kaj faras erarojn, miskomprenas la vivon. Tra senlima serio da reenkarniĝoj li evoluas kaj atingas perfektecon. La Aŭtoro instruas:

Ĉar vivanta estajo ne povas efektive morti, sed nur transiri al "spiritita" spertoformo, tio estas: al tiu sama spertoformo, kiun li eniras ĉe ekdormo, tial li denove devas "vekĝi" al fizika spertoformo en simila maniero, kiel li matene revekiĝas al viva fizika estado." (p. 31).

Tiu unua libreto prezentas doktrinon universalan, tial esperantistoj en ĉiuj mondpartoj povos ĝui ĝin. La dua libreto ne estas tiel universal, ĉar ĝi komparas la ĉefajn festojn de Kristanismo kun la jarsezonoj, dum kiuj tiuj festoj efektiviĝas en Skandinavio; sed en nia mondparto tiuj festoj okazas en tute aliaj sezonoj.

La bonegan tradukon faris nia karmemora samideano C. Graversen.

La volumeto estas plej zorge preparita kaj certe plaĉos al ĉiuj spiritalistoj.

I. G. B.

John Hornby — LUDOVIC LAZARUS ZAMENHOF INVENTOR OF ESPERANTO — Ilustraĵoj de *Colin Andrew*. Eld. Daily Sketch Modern Boys Annual. Broŝurita. 8 p. 17,5 X 23,5 cm.

Ĉi tiu eldonaĵo de Associated Newspapers Ltd, estas interesa el pluraj vidpunktoj. Ĝi estas antaŭ ĉio originala kaj artisme prezentita.

Kian ajn opinion oni havas pri la sistemo de instruado pere de ilustritaj historietoj, oni tamen devas rekoni, ke ekzistas ankoraŭ granda publiko, por kiu tiu sistemo estas la plejalloga kaj, kelkfoje, la sole utiligebla. Mi estas certa, ke multaj infanoj, eĉ gejunuloj, kiuj eble neniam aŭdis pri Zamenhof, kun intereso legos la resumon de lia historio, prezentitan sub la formo elektita de tiu grava angla eldonejo.

La fakto, ke ĝi estis publikigita en angla lingvo estas per si mem altsignifa, ĉar ĝi certigas la atingon de grandnombra legantaro, kaj estas des pli salutinda, se oni atentis pri la klareco kaj korekteco de la lingvaĵo uzita en la dialogoj kaj priskriboj.

Fininte la legadon de tiu ĉarma verketo, oni nur bedaŭras, ke ne estis eble al la verkinto — sendube pro nedispono de sufiĉa spaco — iom pli ampleksigi la historion, kiu ŝajnas tro simpligita kaj resumita.

Ke aliaj eldonejoj en aliaj landoj faru similajn publikaĵojn en siaj lingvoj, — jen nia tutkora deziro.

F. P.

Leander Tell — LA BELA SUBTERA MONDO — Libro pri gro-

toj — Kovrilo de *John Hartley* — 54 ekstertekstaj bildoj — STAFETO: Popularscienca Eldonserio n.º 3 — Eld. *J. Régulo*, Eldonisto, La Laguna, Tenerife, Kanariaj Insuloj, 1959 — 24cm x 16cm — 96 paĝoj — Prezo ĉe BEL Cr\$ 980,00.

La subtera mondo estas fakte bela, danĝere kaj terure bela. En grotoj kaj kavernoj, sub la mondo hela, ekzistas por ĉiu, kiu amas aventurojn, mirinda loko, samtempe alloga kaj deloga. Unue, la vizitanto timas, tiel ke liaj kruroj tremas kaj ke li pentas esti entrepreninta tiel riskan aventuron. Poste, estas tiel multnombraj la mirindaĵoj, tiel ekstazigaj la pejzaĝoj, ke li forgesas sian timon, ensorbigita de la ensorĉa atmosfero. En grotoj oni povas senti sin kiel en la propra hejmo. La danĝero anstataŭas la komforton kaj donas pli da motivo por daŭre vivi feliĉe. Oni jam ne scias kiu el la du mondoj estas la plej admirinda. Tiun mondon, subteran, ĝiajn misterojn kaj nepriskribblajn eltrovaĵojn, la kaŭzojn de formacio kaj konservado de stalaktitoj kaj stalagmitoj ĉion Leander Tell priskribas en tiu libro. Li estas vere sperta pri tiaj subteraj studoj. Ne nur tio: li majstre kondukas nin en plurajn eŭropajn kaj ekstereŭropajn grotojn, avertante nin pri la risko, la danĝera gaso mortiganta tiun, kiu nesingarde rampas surgrunde, kaj atentigante nin pri tiu kaj tiu vidindaĵo, klarigante kelkajn detalajn punktojn, kiuj al ni restus nerimarkeblaj se ne estus lia gvidado. Lia libro estas dufaka: studlibro kaj libro pri aventuro. La bildoj kompletigas la studon.

Certe la Esperanta literaturo treege riĉiĝas per tiu originala verko, aldona al la Popularscienca Eldonserio,

kiu enviciĝas en la kolekton STAFETO. La esperantistoj multon ŝuldas al la eldonisto Juan Régulo, kiu eldonas nur majstrajn kaj legindajn verkojn, kiuj havas nepran akcepton en la merkato. La insigno STAFETO estas garantia marko.

J. V. M.

ESPERANTO NO ESTRANGEIRO

Argentina — O Esperanto-Klubo de Venado Tuerto recebu do Govêrno da Província de Santa Fé a subvenção de cem mil pesos.

Austrália — Na Austrália (10 milhões de habitantes) há menos de cem habitantes, que podem falar uma língua asiática.

Austria — O Ministério da Instrução concedeu à Sociedade de Professores Austriacos de Esperanto uma subvenção de 1000 chelins autriacos.

Espanha — Em *Barcelona*, o Conselho Municipal deu a nova rua, no bairro La Verneda, a denominação *Dr. Zamenhof*.

Holanda — Por ocasião de seu Congresso Jubilar (Maio 1961) a Associação Esperantista dos Trabalhadores, em Amsterdam, recebeu a subvenção de 1000 guldens, do Centrale Arbeiders Verzekeeringsbank.

Hungria — O Sindicato de Pedagogia Húngaro informou o estabelecimento de um curso especial de Esperanto, para que os professores das escolas húngaras possam ensinar a língua internacional no próximo ano letivo.

Itália — Rádio Roma (Esperanto-fako) continua a irradiar para o mundo seus excelentes programas de Esperanto, todas as terças, quartas e sextas-feiras, de 18 h 55 a 19 h 10 (M.E.T.) sob a direção dos Srs. L. Minnaja e Dr. V. Musella.

Tenerife — Em novo, belo quarteirão *La Laguna* inaugurou o Prefeito a rua *Zamenhof*, nas proximidades da Universidade.